Svedaj, Svisaj kaj Francaj blinduloj, de kelka tempo, komencis korespondadi inter ili kaj la rezultatoj estas la plej feliĉaj. En Belgujo, ni mem konstatis la progresojn faritajn de junaj blinduloj post kelkaj semajnoj kaj la akcepto de Esperanto ĉe ĉiuj lernejoj de blinduloj estas proksime decidota. Direktoro de Aŭstralia Instituto por blinduloj vizitis Anglujon kaj miris kiam li aŭdis blindulojn parolantajn Esperante ; alvenita en Belgujo, li faris saman konstaton kaj decidis enkonduki Esperanton en sian Instituton.

Tiaj rezultatoj meritas la aprobon de ĉiuj amikoj niaj ; ni kuraĝigu kaj subtenu ilin kiel eble plej multe. Por ni estas devo.

***

Rapidege, ankoraŭ kelkaj sciigoj.

La vortareto de S^oj Th. Cart kaj aliaj ricevis duan eldonon, kie kelkajn nevolajn erarojn oni korektis kaj kelkajn forgesojn oni malaperigis ; tiu nova eldono pruvas ke tiu libro estis tute necesa kaj alvenis ĝustatempe. Ĝi estos tre utila por la lernantoj de la **trideko** da kursoj organizataj en Parizo kaj al la multnombraj varbotoj de la kursoj kiujn la **dudek sep** Francaj kaj la Belgaj grupoj fondigis.

En Londono, la « Daily Chronicle » anoncas malfermon de senpagaj kursoj en la diversaj kvartaloj de la granda urbo.

Fine S^ro Davidov, sekretario, anoncas fondon de grupo en Silistra (Bulgarujo) kies prezidanto estas S^ro Raĉer kaj, aliparte, S^ro Varjn sciigas ke grupo formiĝis en Buda, frataurbo de Peŝto (Hungarujo).

Jos. JAMIN.

prise chez les aveugles. Le succès de leurs premiers efforts les a encouragés et aujourd'hui nous pouvons annoncer que la bibliothèque Espérantiste en lettres « Braille » pour aveugles compte 40 volumes. Les principaux ouvrages sont imprimés mécaniquement : ce sont les manuels français, anglais, allemand, et le recueil d'exercices du Dr Zamenhof; les autres sont manuscrits — également en Braille — et la collection comprend les vocabulaires, la traduction de Hamlet, l'histoire des aveugles, morceaux choisis (prose), monadologie de Leibnitz, etc. On peut se procurer ces ouvrages chez le secrétaire de L. I. à Paris ; on peut aussi s'adresser à notre rédaction qui donnera tous les renseignements spéciaux au sujet de cette question et recevra les dons des personnes généreuses en faveur de cette œuvre louable.

Depuis quelque temps, des aveugles suédois, suisses et français ont commencé à correspondre entre eux et les résultats sont des plus heureux. En Belgique nous avons pu constater par nous-même les progrès faits par de jeunes aveugles après quelques semaines et l'introduction de l'Esperanto dans toutes les institutions d'aveugles sera prochainement décidée. Un directeur d'Institut pour aveugles en Australie a visité l'Angleterre et fut très étonné lorsqu'il entendit des aveugles parler l'Esperanto ; arrivé en Belgique il fit la même constatation et décida d'adopter l'Esperanto dans son Institut. De tels résultats méritent l'approbation de tous nos amis ; encourageons-les et soutenons-les le plus possible.

C'est pour nous un devoir.

***

Au galop, encore quelques informations.

Le vocabulaire de MM. Th. Cart et consorts est publié en seconde édition où quelques erreurs involontaires ont été corrigées et quelques oublis réparés ; cette nouvelle édition prouve que ce livre est de toute nécessité et arrive à son heure. Il sera très utile aux élèves des TRENTE cours organisés à Paris et aux nombreuses recrues des cours que les 27 groupes français et les groupes belges ont établis.

A Londres, la « Daily Chronicle » nous annonce l'ouverture de cours gratuits dans les divers quartiers de la grande ville.

Enfin M. Davidov, secrétaire, nous fait part de la constitution d'un groupe à Silistra (Bulgarie) dont le président est M. Raĉer, et d'autre part, M. Varjn nous fait savoir qu'un groupe s'est formé à Buda, la ville-sœur de Pest (Hongrie).

Jos. JAMIN.

blinden ondernomen hebben. De bijval hunner eerste pogingen heeft hen aangemoedigd, en wij kunnen tegenwoordig mededeelen, dat de Esperantische boekenverzameling in « Braille » letters, voor blinden, 40 boekwerken telt. De voornaamste werken zijn mekanisch gedrukt : het zijn de Fransche, Engelsche en Duitsche handboeken, en de keus van oefeningen van Dr Zamenhof ; de andere zijn handschriften — ook in « Braille » — en de verzameling bevat de woordenboeken, de vertaling van Hamlet, de geschiedenis der blinden, uitgekozene stukken (proza), monadologie van Leibnitz, enz.

Men kan zich deze werken aanschaffen bij den schrijver van L. I. te Parijs ; men kan zich ook wenden tot onzen opstelraad, die alle bijzondere inlichtingen over deze kwestie zal geven, en de giften, door edelmoedige personen ten voordeele van dit lofbaar werk gegeven, zal ontvangen.

Sedert eenigen tijd hebben Zweedsche, Zwitsersche en Fransche blinden onder elkander begonnen brieven te wisselen en de uitslagen zijn van de beste.

In België hebben wij zelf den vooruitgang van jonge blinden na eenige weken kunnen bestatigen, en de invoering van het Esperanto in alle de blindengestichten zal in 't kort beslist worden. Een bestuurder van een blindengesticht in Australië heeft Engeland bezocht en was zeer verwonderd wanneer hij de blinden hoorde Esperanto spreken ; in België aangekomen, bestatigde hij hetzelfde en besloot het Esperanto in zijn gesticht aan te nemen. Zulke uitslagen verdienen de goedkeuring van al onze vrienden ; laat ons ze om ter meest aanmoedigen en ondersteunen.

't Is een plicht voor ons.

***

In der haast nog eenige inlichtingen.

Het woordenboek van de HH. Th. Cart en medewerkers wordt in tweede uitgave uitgegeven, waarin eenige onvrijwillige misslagen verbeterd en eenige vergetelheden hersteld zijn. Deze nieuwe uitgave bewijst dat dit boek hoogst noodzakelijk is en ter goeder uur komt. Het zal zeer nuttig zijn voor de leerlingen der dertig leergangen, te Parijs ingericht, en voor de talrijke nieuwelingen der leergangen welke de 27 Fransche groepen en de Belgische kringen ingericht hebben.

Uit Londen meldt ons de « Daily Chronicle » de opening van kostelooze leergangen in de verscheidene kwartieren der groote stad.

Eindelijk doet ons M. Davidov, sekretaris, melding van de inrichting eener groep te Silistra (Bulgarië) waarvan de voorzitter M. Raĉer is ; en van eenen anderen kant laat M. Varjn ons weten dat eene groep gevormd is te Buda, de zusterstad van Pest (Hongarië). Vertaald door A.-J. WITTERYCK.

Kroniko Belga.

Antaŭ ĉio, ni korektu novaĵon kiun ni skribis en nia lasta kroniko. Ni diris, efektive, laŭ legitaj neplenaj informoj, ke la « Asociacio de l'Akademioj » por la unua fojo kunvenos en Parizo la proksiman jaron ; tio estas nevera : jam ĝi kunvenis en Parizo dum 1901 kaj por la dua fojo ĝi kunvenos dum 1904 en Londono : tiam sendube estos proponata kaj priparolata la demando pri la lingvo internacia.

Malmulte da novaĵoj dum ĉi-tiu monato.

Je la unua kunveno de l'membroj de la Brusela Klubo Poliglota, la 12^{an} de Oktobro, S^{ro} L. Blanjean, inter aliaj paroladantoj, diris pledadon por Esperanto : de tiu tago rekomenciĝis la kursoj. La Esperantista sekcio, aliformigita laŭ nova regularo, kunvenos je l'unua lundo de ĉiu monato post la Esperanta kurso ; la aliajn lundojn, oni okupos sin je fundamenta ellernado de la lingvo, Esperanta interparolado, k. c.

En Loveno, ankaŭ rekomenciĝis la kursoj post publika kunveno dum kiu paroladis S^{oj} Mathys kaj Van Dieren. La kursoj estis diskonigitaj tra la tuta urbo per grandaj afiŝoj, sur kiuj la vorto Esperanto, per grandegaj verdaj literoj, devige altiris la rigardojn. Kompreneble, post preparado tiel efika, multe da lernantoj (pli ol 150) alvenis al la kursoj. La « Virina Sekcio » jam enhavas 56 aninojn.

Antaŭ kelkaj tagoj, niaj Antverpenaj amikoj elpendigis je la antaŭa flanko de sia sidejo la blazonŝildon de la grupo : ĝi ŝajnas belega laŭ la priskribo kaj certe kunhelpos al la propagando de tiu agema societo ; ankaŭ ni ricevis tre beletan poŝtan karton eldonitan de tiu grupo. La 7^{an} de Novembro, tre sukcesa kunveno okazis ĉe la sidejo « Taverne Royale » por festi la rekomencon de l' kursoj. Antaŭ grandnombra aŭdantaro, S^{ro} L. Blanjean, el Bruselo, faris paroladon pri la evolucio de Esperanto : la sukceson de tiu parolado atestas multaj artikoloj kiujn ni legis en la Antverpenaj ĵurnaloj : « La Metropole », « Het Handelsblad », « Le Matin », « L' Escaut ».

La unua kunveno de la « Esperantista Studenta Grupo » de la Genta Universitato okazis la 3^{an} de Novembro kaj oni elektis por la akademia jaro 1903-1904 komitaton konsistantan el : Prezidanto, S^{ro} M. Seynaeve ; Sekretario, S^{ro} E. Cauterman ; kasisto, S^{ro} G. Van den Abeele ; kelkajn aliajn komitatanojn oni elektos post kelkaj semajnoj.

Chronique Belge.

Corrigeons, avant tout, une nouvelle, publiée dans notre dernière chronique. Nous avons écrit, en effet, nous basant sur des renseignements incomplets, que l' « Association internationale des Académies » se réunira pour la première fois à Paris l'année prochaine : cela est inexact car elle s'y est déjà réunie en 1901 et c'est à Londres qu'elle se réunira pour la seconde fois, en 1904 : c'est alors que vraisemblablement sera proposée et discutée la question de la langue internationale.

Peu de nouvelles ce mois-ci.

Lors de la première réunion des membres du Cercle Polyglotte de Bruxelles, le 12 octobre, M. L. Blanjean, entre autres orateurs, fit une plaidoirie en faveur de l'Esperanto : les cours ont repris depuis ce jour. La section Espérantiste, transformée par l'adoption d'un nouveau règlement, se réunira après le cours d'Esperanto le premier lundi de chaque mois ; les autres lundis, une étude approfondie de la langue, des conversations en Esperanto, etc., occuperont les séances.

Les cours ont aussi repris à Louvain après une réunion publique où se firent entendre MM. Mathys et Van Dieren. Les cours avaient été annoncés dans toute la ville au moyen de grandes affiches, sur lesquelles le mot Esperanto, en d'énormes lettres vertes, attirait nécessairement les regards. Après une préparation aussi efficace, les cours sont naturellement fréquentés par un grand nombre de personnes (plus de 150). La « Section des Dames » comprend déjà 56 adhérentes.

Il y a quelques jours, nos amis Anversois ont appendu à la façade de leur local l'écusson du groupe : d'un aspect magnifique d'après la description qu'on nous en a faite, il coopérera certainement à la propagande de ce cercle si actif ; nous avons reçu aussi une très jolie carte postale, éditée par ce groupe. Le 7 Novembre, une séance très réussie a été organisée au local « Taverne Royale » à l'occasion de la réouverture des cours. Devant un nombreux auditoire, Mr L. Blanjean de Bruxelles a retracé, dans une conférence, l'évolution de l'Esperanto. Le succès de la conférence est attesté par de nombreux articles parus dans la presse Anversoise : « La Métropole », « Het Handelsblad », « Le Matin », « L'Escaut ».

La première réunion de l' « Esperantista Studenta Grupo » de l'Université de Gand a eu lieu le 3 Novembre ; le bureau pour l'année académique 1903-1904 a été composé comme suit : Président, M. M. Seynaeve ; secrétaire, M. E. Cauterman ; trésorier, M. G. Van den Abeele ; le bureau sera complété dans quelques semaines.

Belgische Kroniek.

Wij moeten, eerst en vooral een nieuws verbeteren, dat in onze laatste kroniek verschenen is : Wij hebben, inderdaad, geschreven, ons steunende op onvolledige inlichtingen, dat de « Association internationale des Académies » voor de eerste maal tе naaste jaar te Parijs zal vergaderen : dit is onjuist, want zij heeft er reeds in 1901 vergaderd, en 't is te Londen dat zij in 1904 voor de tweede maal zal bijeenkomen ; 't is dan dat waarschijnlijk het vraagstuk der wederlandsche taal zal voorgesteld en besproken worden.

Weinig nieuws, deze maand.

Op de eerste vergadering der leden van den Talenkring van Brussel, 12 Oktober, deed M. L. Blanjean, onder andere redenaars, eene pleitrede ten voordeele van het Esperanto : de leergangen zijn van dezen dag af herbegonnen. De Esperantische afdeeling, gewijzigd door de aanneming van een nieuw reglement, zal iederen eersten Maandag der maand na den leergang vergaderen ; de andere maandagen, zullen de zittingen door eene diepgrondige studie der taal, door Esperantische gesprekken, enz. gevuld worden.

Te Leuven zijn de leergangen ook herbegonnen, na eene openbare vergadering, waar MM. Mathys en Van Dieren zich lieten hooren. De leergangen waren door gansch de stad aangekondigd geweest, door middel van groote plakbrieven, waarop het woord Esperanto in overgroote groene letters noodzakelijk de blikken trok. Na eene zoo krachtige voorbereiding, worden de leergangen natuurlijk door een groot aantal personen bijgewoond, (meer dan 150). De « Afdeeling der Damen » behelst reeds 56 aankleefsters !

Over eenige dagen hebben onze Antwerpsche vrienden aan den gevel van hun lokaal, het schild van den kring gehangen : daar het, naar de beschrijving welke men er ons van gedaan heeft, een prachtig uitzicht heeft, zal het zekerlijk medewerken tot de propaganda van deze zoo werkzame groep. Wij hebben ook eene schoone postkaart ontvangen, door dezen kring uitgegeven.

Op 7^{n} November is eene welgelukte zitting ingericht geworden in de zaal « Taverne Royale » ter gelegenheid van de heropening der leergangen. Vóór eene talrijke vergadering heeft de Heer L. Blanjean van Brussel, eene voordracht gehouden over de beweging van het Esperanto. Het welgelukken der voordracht is bevestigd geworden door menige artikels, verschenen in de Antwerpsche drukpers : « La Métropole », » Het Handelsblad », « Le Matin », « L'Escaut ».

De eerste vergadering van de « Esperantista Studenta Grupo » der hoogeschool van Gent heeft op 3^{en} November plaats gehad ; het bestuur voor het academisch jaar 1903-1904 is samengesteld als volgt : Voorzitter : M. M. Seynaeve, schrijver : M. E. Cauterman, schatbewaarder : M. G. Van den Abeele ; het bureel zal bin-

ĵurnalajn artikolojn por Esperanto ni legis en « Het Nieuws van den dag » « Le Courrier de Bruxelles » « l'Ami de l' Ordre » kaj « XXe Siècle », skribitajn de S^ro^ P. Mattelaer ; en multaj Lovenaj gazetoj, nome « De Gazet », « Louvain-Journal », « Klim op », k. c. ; ankaŭ en « Bulletin de la Fédération post-scolaire de St Gilles », en « De Limburger » kaj en « Gazet van Thienen » kiu enhavis parton de nia oktobra kroniko.

MAURICE SEYNAEVE.

La paroladoj de S^ro^ Profesoro Lambert.

Tiuj paroladoj, pri kiuj ni jam skribis la lastan monaton, certe okazos je la lastaj tagoj de l' Novembra monato en la 4 universitataj urboj : Gento, Loveno, Bruselo, Lieĝo ; parolado ankaŭ estas farota en Antverpeno, ĉar tiu urbo, precipe laŭ komerca vidpunkto, estas tre grava centro. Plie, jen kelkaj detaloj kun la ordo de l' paroladoj :

Gento. La « Esperantista Studenta Grupo » prenis sur sin la organizadon de l' parolado : tiu-ĉi estos farata Jaŭdon, 26^an^ de Novembro, je 8 1/2 horo vespere, en la « Palaco de l'Universitato » (Akademia Ĉambrego). Car la parolado okazos en tiu belega ĉambrego (nur uzata por la ceremonio de l' solena malfermo de l' akademia jaro) kaj ankaŭ pro la allogo de tiu kiu prezidos la kunvenon : S^ro^ profesoro Massau, honora prezidanto de la « Esperantista Studenta Grupo », oni prave antaŭvidas grandan sukceson. S^ro^ profesoro Massau, efektive, ĵus konsentis fariĝi honora prezidanto de tiu grupo : malnova fervora volapukisto hodiaŭ konsentanta pri la granda supereco de Esperanto, Sinjoro Massau estas sindonema aliĝinto de la ideo pri la Lingvo Internacia. Lia ŝatinda aliĝo estos grava kaŭzo de la sukceso ĉar, pro sia granda instruiteco kaj sia afableco, Sinjoro Massau estas unu inter la profesoroj plej estimataj kaj amataj de l' studentoj. Sinjoro J. Massau, profesoro ĉe la Fakultato scienca de l' Genta Universitato, estas membro de la Belga Reĝa Akademio.

Loveno. Parolado estos farata Vendredon, 27^an^ de Novembro, ĉe la « Fédération Wallonne des Etudiants ».

Nous avons lu des articles en faveur de l'Esperanto dans « Het Nieuws van den Dag » « Le Courrier de Bruxelles » « l'Ami de l'Ordre » et « Le XXe Siècle », émanant de M. P. Mattelaer ; dans de nombreux journaux de Louvain : « De Gazet », « Louvain-Journal », « Klim op », etc. ; encore dans « Le Bulletin de la Fédération post-scolaire de St-Gilles », dans « De Limburger » et dans « Gazet van Thienen » qui a reproduit une partie de notre chronique d'octobre.

MAURICE SEYNAEVE.

Les conférences de M^r^ le Professeur Lambert.

Les conférences, que nous annoncions déjà le mois dernier, ont été fixées définitivement aux derniers jours du mois de novembre ; elles auront lieu dans les 4 villes universitaires du pays : Gand, Louvain, Bruxelles, Liége ; une conférence se donnera encore à Anvers à cause du très grand intérêt que présente cette ville surtout au point de vue commercial. Voici au surplus quelques détails en même temps que l'ordre des conférences :

Gand. C'est l' « Esperantista Studenta Grupo » qui s'est chargé de l'organisation de la conférence ; celle-ci se donnera jeudi, 26 novembre, à 8 1/2 heures du soir, au Palais de l'Université (Salle Académique), Rue des Foulons. Le fait que la conférence se donnera dans cette salle magnifique (qui ne sert qu'à la cérémonie de l'ouverture solennelle de l'année académique), joint au prestige de celui qui présidera la réunion : M^r^ le professeur Massau, Président d'honneur de l' « Esperantista Studenta Grupo », font augurer un grand succès. M^r^ le professeur Massau vient en effet d'accepter la présidence d'honneur de ce groupe : ancien fervent Volapükiste reconnaissant aujourd'hui la grande supériorité de l'Esperanto, Monsieur Massau est un adhérent dévoué de l'idée de la Langue Internationale. Sa précieuse adhésion constituera un sérieux élément de succès car par sa profonde science et son affabilité, Monsieur Massau est un des professeurs les plus estimés et les plus aimés parmi les étudiants. Monsieur J. Massau, professeur à la Faculté des Sciences de l'Université de Gand, est membre de l'Académie Royale de Belgique.

Louvain. Une conférence se donnera vendredi, 27 novembre, à la « Fédération Wallonne des Etudiants ».

nen eenige weken volledig zijn.

Wij hebben gunstige artikels over het Esperanto gelezen in : « Het Nieuws van den Dag », « Le Courier de Bruxelles » en « Le XXe Siècle » komende van M. P. Mattelaer ; in menigvuldige bladen van Leuven : « De Gazet », « Louvain-Journal », « Klim-op », enz., ook in « Le Bulletin de la Fédération post-scolaire de St Gilles » in « De Limburger » en in de « Gazet van Thienen » die een deel van onze kroniek van Oktober overgeschreven heeft.

Vertaald door A.-J. WITTERYCK

De Voordrachten van M. Leeraar Lambert.

De voordrachten, welke wij reeds verledene maand aankondigden, zijn bepaaldelijk vastgesteld geweest, op de laatste dagen van de maand November ; zij zullen plaats hebben in de 4 hoogeschoolsteden des lands : Gent, Leuven, Brussel, Luik.

Te Antwerpen zal ook eene voordracht gegeven worden, om reden van het groot belang dat deze stad aanbiedt, vooral onder handelsopzicht. Ziehier bovendien eenige nadere bijzonderheden te zamen met de orde der voordrachten :

Gent. *'t Is de « Esperantista Studenta Grupo » die zich met de inrichting der voordracht gelast heeft ; deze zal op Donderdag, 26 November, ten 8 1/2 ure 's avonds gegeven worden in het paleis der hoogeschool (Academiezaal), Voldersstraat.*

Het feit dat de voordracht in deze zaal (die slechts dient tot de plechtigheid der plechtige opening van het academisch jaar) zal gegeven worden, gevoegd bij den invloed van deze die de vergadering zal voorzitten : M. de Leeraar Massau, Eerevoozitter van den « Esperantista Studenta Grupo », doet een grooten bijval voorzien.

M. de Leeraar Massau, inderdaad, komt het eerevoorzitterschap van deze groep te aanveerden : oud vurige Volapükist zijnde, nu de groote voortreffelijkheid van het Esperanto erkennende, is M. Massau een toegenegen aanhanger van het gedacht der Wederlandsche taal. Zijne kostelijke toetreding zal zeer veel tot den bijval aanbrengen, want door zijne diepe kennis en zijne minzaamheid is M. Massau een der meest geëerde en meest beminde leeraars, onder de studenten. M. J. Massau, leeraar aan de faculteit der Wetenschappen der Hoogeschool van Gent, is lid der Koninklijke Academie van België.

Leuven. *Eene voordracht zal gegeven worden op Vrijdag, 27 November, in de « Fédération Wallonne des Etudiants ».*

Bruselo. Sabaton, 28an de Novembro, je l' 8a vespere, parolado ĉe la « Festa Ĉambrego » de « Hotel Ravenstein », je la aŭspicioj de l' Klubo Poliglota.

Liego. Dimanĉon, 29an de Novembro, je l' 4a posttagmeze, parolado ĉe la « Akademia Ĉambrego » de l'Universitato, je la aŭspicioj de la « Federacio de l' Universitataj societoj. »

Antverpeno. Lundon, 30an de Novembro, vespere, parolado ĉe la festa ĉambrego de l' « Cercle artistique, littéraire et scientifique d'Anvers, rue d'Arenberg », je la aŭspicioj de l'Antverpena Grupo Esperantista.

Plenajn detalojn pri la paroladoj enhavos nia decembra numero.

MAURICE SEYNAEVE.

Amo fila.

Estis en la insulo Sankta Domingo. Malfeliĉa plantisto estis kondamnita je morto, tial ke malsaĝuloj kulpigis lin konspiri kontraŭ la registaro.

Oni do sendis militistojn por lin kapti en lia hejmo, inter lia virino kaj liaj infanoj, kiuj ploregis. Oni ekkaptis lin, ligis al li la manojn, kaj poste kondukis lin antaŭ lian pordon.

Tiam la militistestro ordonis al li genuflekson kaj diris al siaj soldatoj ke ili preparu siajn pafilojn.

Jam ŝarĝitaj estis la pafiloj kaj la pafiltuboj estis direktitaj al la brusto de la plantisto, kiam subite eksonis krio fortega. En la sama momento, fraŭlino kuris tra la militistoj, kaj sin ĵetis antaŭ la kondamniton kvazaŭ ŝi volis fari al li remparon per sia korpo.

La pafordononto, mirigita, diris al ŝi foriĝi; sed ŝi restis trankvile sur la sama loko, kvazaŭ ŝi ne estis aŭdinta.

Li volis uzi la forton por ricevi obeon de ŝi, sed tiu fraŭlino ĉirkaŭprenis la puniton per siaj brakoj, kaj estis neeble malkunigi ilin.

« Vi min mortigos, ŝi diris, vi min mortigos, ĉar mi ne volas forlasi mian patron. Ne, ne, mi ne volas forlasi lin, mi pliamas morti kun li. »

La kuraĝa knabino, kiu tiel parolis, estis apenaŭ deksep jara. La militistestro, kortuŝita, ne kuraĝis ordoni la pafadon. La ekzekuto estis prokrastita. Oni kondukis en malliberejon la puniton kaj lian filinon, kiu ĉirkaŭprenis ĉiam sian patron.

La morgaŭan tagon, la regnestro de la insulo pardonis la plantiston, por rekompenci la pian amon de tiu knabino, modelo de sentemeco kaj de kuraĝeco.

Tradukita de : Jos. DE HEMPTINNE, Liego.

Petro la Granda en la ŝipkonstruejo de l'Orienta-Hindakompanio.

Petro la Granda ne povis kaŝi sian bedaŭron, pro tio ke lia celo vivi nekonate kaj trankvile en Zaandam — urbeto Holanda — estis malsukcesinta. Sian intencon mem : lerni praktike la ŝipkonstruadon kiel ĉarpentisto, li neniam povis forlasi. Ĉar Witsen tiam estis la ĉefo de l' Orienta-Hindakompanio, oni ne malproksime kaj longe devas serĉi la kaŭzon pro kio li decidis peti sinjorojn estrojn ke oni donu al li loĝejon sur ilia ŝipkonstruejo kaj havigu al li la okazon — kiam li estos ĉarpentanta goleton aŭ fregaton — observi ĉion, kio estas necesa por konstrui ŝipon.

Jam la 29an de Aŭgusto 1754, tiu ĉi propono estis farita de l' tradukisto de l' Caro, leŭtenanto Vander Hulst, je l' nomo de l' granda ambasadoro, en eksterordinara kunveno de l' estroj, kaj akceptita kun la plej granda amindeco.

Petro trovis la loĝejon sur la ŝipkonstruejo laŭ sia deziro kaj eklogiĝis en ĝin kun kelkaj sekvantoj, inter kiuj estis ia princo Bragation kaj eble ankaŭ grafo Petro Apraxin, poste ĉefadmiralo de Rusujo. La unua amigis sin precipe agante senĉese laŭ la deziroj de l' Caro. Tre atentoplena li estis pri ĉio, kion li vidis kaj aŭdis, tiel ke li baldaŭ konis parkere ĉiujn teknikajn terminojn de l' ŝipkonstruado kaj de l' marveturado. Ankaŭ li baldaŭ estis sperta kaj lerta ŝipisto.

Bruxelles. Samedi, 28 novembre, à 8 h. du soir, conférence dans la « Salle des fêtes » de l'Hôtel Ravenstein, sous les auspices du Cercle Polyglotte.

Liége. Dimanche, 29 novembre, à 4 h. de l'après-midi, conférence dans la « Salle Académique » de l'Université, sous les auspices de la « Fédération des Cercles Universitaires ».

Anvers. Lundi, 30 novembre, le soir, conférence dans la salle des fêtes du « Cercle artistique, littéraire et scientifique d'Anvers », Rue d'Arenberg, sous les auspices de l'Antverpena Grupo Esperantista.

Notre numéro de décembre donnera le compte-rendu détaillé des conférences.

MAURICE SEYNAEVE.

Brussel. *Op Zaterdag, 28 November, ten 8 ure 's avonds, voordracht in de « Feestzaal » van het Hotel Ravenstein, onder het beleid van den Talenkring.*

Luik. *Op Zondag, 29 November, ten 4 ure van den namiddag, voordracht in de « Academiezaal » der Hoogeschool, onder het beleid van de « Fédération des Cercles Universitaires ».*

Antwerpen. *Op Maandag, 30 November, 's avonds, voordracht in de feestzaal van den « Cercle artistique, littéraire et scientifique d'Anvers » Arenbergstraat, onder het beleid van de Antverpena Grupo Esperantista.*

Ons Decembernummer zal het breedvoerig verslag der voordrachten geven.

Vertaald door A.-J. WITTERYCK.

***

En la komenco, la tablo de l' Caro estis servita de l' kelnero de l' sinjorhotelo, sed tio ĉi tedis baldaŭ al Petro kaj li mem mastrumadis. Sin levante frumatene pro kutimo, li ne havis difinitan tempon por tagmanĝi, sed manĝis kiam li estis malsata : li mem hejtis la fajron kaj kuiris la manĝaĵon. En ĉio li vivis tie ĉi kiel ĉarpentisto kaj preferis esti nomita « Petro ĉarpentisto de Zaandam ». En la jaro 1754ᵃ vivis ankoraŭ kredinda komandanto kiu rakontis ke li diversfoje estis vidinta la Caron laborantan, vestitan kiel ĉarpentisto. Se venis iu por paroli al li, tiam li iris ŝidiĝi kun la hakilo inter la kruroj, sur la kurbitajn lignaĵoj. Sed tion ci ne devis daŭri tro longe, ĉar alie li tion finiĝis kaj reiris prilabori la lignaĵon al li donitan laŭ la modelo. Tre eminenta viro deziris foje, ne estante rimarkita, vidi lin laborantan kaj por tiu celo iris kun la ĉefo. Tiu ĉi promesis nomi la Caron per lia nomo kaj post iom da tempo kelkaj laboristoj preterpaŝis portantaj pezan pecan da ligno. La ĉefo demandis: « Petro ĉarpentisto de Zaandam ! Kial vi ne helpas tiujn virojn ? » Li tuj obeis, metis sian ŝultron suben kaj alportis la pecon lignan kien ĝi devas esti. Tie ĉi kiel en Zaandam oni metis lin en bona humoro, lin nomante « Petromastro ». Li sin deturnis de tiuj, kiuj lin nomis « Via Moŝto » aŭ « Sinjoro » kiam li estis vestita kiel ĉarpentisto.

En la unuaj tagoj, kiam li estis sur tiu ĉi ŝipkonstruejo li ricevis leteron de la Patriarho el Rusujo, li respondis inter alie al tiu ĉi ke li en Amsterdam obeas la vortojn : « Vian ĉiutagan panon vi meritos per la ŝvito de via vizaĝo. »

El la Holanda lingvo tradukis C. J. HOMBURG el Middelburg.

Akompanado de la butersemajno ĉe la Ĉuvaŝoj.

Akompanado de l' butersemajno (1) okazas en la dimanĉo. Por tiu ĉi festo oni preparas kvazaŭvirinon, kiu devas prezenti per si « butersemajnon ». La kvazaŭvirinon oni ornamas per diversaj rubandetoj, diverskoloraj ĉifonetoj k. t. p., sur la kapon oni metas altan ĉapon, sur kiun oni pendigas sonoriletojn kaj tintiletojn. La « butersemajnon » oni starigas en ŝipeton, ornamitan per flagoj, kaj veturigadas ŝin tra la vilaĝo sur simpla glitveturilo, al kiu estas aljungitaj tri ĉevaloj, ankaŭ ornamitaj per rubandoj kaj tintiletoj. Sekvante la « butersemajnon » unu post la alia moviĝas glitveturiloj, ornamitaj per tapiŝoj, en kiuj sidas vestitaj per festaj kostumoj Ĉuvaŝoj (2) kaj Ĉuvaŝinoj. Antaŭ la glitveturilaro estas veturantaj muzikistoj, kiuj ludas per violonoj, harpoj kaj aliaj plej amataj Ĉuvaŝaj muzikiloj. La motivoj de tiu ĉi muziko estas neniel priskribeblaj. Tiu ĉi admirinda orkestro elsonigas iajn sengraciajn, neaŭditajn sonojn, kiuj faras plej plenan malharmonion; ĝi estas ia sona ĥaoso, malgajiganta la plej nepostuleman aŭdanton. La Ĉuvaŝoj, krom tio, ne havas eĉ unu propran, nepruntitan muzikan motivon.

Dum tiu ĉi komuna kolektiĝo de la tuta vilaĝa societo, junaj buboj rigardadas knabinojn, kaj knabinoj bubojn, elektante al si tiamaniere fianĉojn kaj fianĉinojn.

Tiu ĉi veturado daŭras ĝis la noktomezo. La veturadantoj sin regaladas per brando, biero kaj diversaj malkaraj vilaĝaj frandaĵoj. La orkestro ludas senĉese. El kelkaj glitveturiloj aŭdiĝas kantoj.

Je la dek-dua horo de l' nokto la sinjorinon « butersemajnon », ĉe la komunaj krioj de l' veturadantoj, oni prenas de l' glitveturilo kaj forportas, tuj post tio la tuta veturadantaro disiras por reiri hejmen.

K. BOGUŜEVIĈ, Stavropol-Kavkazskij, Rusujo.

Novaj Protektantaj Abonantoj

— *SEPA NOMARO* —

Inĝeniero A. A. Zinovjev, Poltava, Rusujo.
Sro B. Witkamp, Rotterdam, Holando.
Sro J. Massau, Prof. ĉe la Universitato, Gento, Belgujo.
Sro Poljanskij. Ĥabarovsk s/Amur, Orienta Azio.
Sro Jean Borel, Berlin, Germanujo.

(1) Butersemajno — respondanta al la Okcident-Eŭropa karnavalo — estas nomata tiel, tial ke en la specialajn manĝaĵojn de tiu ĉi semajno oni metas multe da butero ; la ĉefa manĝaĵo estas flanoj, kiujn oni manĝas kun fluidigita varma butero. (Rusoj en tiu ĉi semajno ne manĝas aŭ, almenaŭ, ne devas manĝi viandon).

(2) Ĉuvaŝoj estas popolo loĝanta sur la dekstra bordo de r. Volgo, en la limoj de Kazan'a gubernio.

En Pireneoj Orientaj. (1)

Ĉar antaŭnokton estis granda pluvego en montoj, ni decidis viziti akvofaleton proksiman por ĝui spektaklon de akvaro falanta. Kvankam sur pintoj verdaj aperis nuboj, vetero ŝajnis bela kaj ĉielo, je zenito, estis pura kaj klara. Ni suriris per mallarĝa ŝtuparŝajna vojeto, jen barata de falantaj riveretoj kiuj nin superŝprucis per ŝaŭmo, jen kuranta sur larĝaj dubegrizaj ŝtonoj, jen rampanta sur vertikala flanko de ia terura murego de ŝtonego kiu, dekstre, altiĝis ĝis nuboj kaj, maldekstre, falis ĝis nevidebla rivero kiu muĝis en profundaĵo.

Baldaŭ ni alvenis sur randon de ia plataĵeto kaj subite, ni ekvidis tutan suban pejzaĝon kun valaĵoj de «Tech» kaj «Tet» riveroj, larĝan ebenaĵon kiu produktas vinojn famajn de «Banijuls»; norde en profundo, strange altranĉitaj montetoj kaj oriente, maro, bluaĵo malpala, hela, radianta sub suno, tiu mirinda bluo pura, beleco nekomparebla de Meza-maro.

Suden ni reenrigardis: neĥio. Ia grizaĵo movanta, senforma, senlima, rulanta en faŭkoj, disŝirata de pintoj, glutanta ĉion en sia ĥaoso, alvenis al ni. Mi ektimis: nebulo! Kaj jen tio venas, fluas ĉirkaŭ ni, envolvas nin, donante al ĉio strangan ŝajnon. Jen kelkaj erikoj, kvin metroj antaŭ ni, sur rando de plataĵeto, griziĝas, malpreciziĝas. Okulo nekutimata vidas mirege ilin grandigantajn, malproksimiĝantajn, forkurantajn ĝis senlima horizonto kaj subite, anstataŭ valoj, urboj kaj maro, ni rigardas antaŭen, fantoman ebenaĵon, grizan, senfinan kun, en fondo, kelkaj grandaj arboj, nebulan pejzaĝon de grenkampo en vintra mateno.

Mia kamarado premis mian manon kun ekscitiĝo. — Estas bele, li diris, kaj mi jesigis per movo de kapo. Kiu ne vidis, ne povas kredi kiel impresiga estas tia vidaĵo. Ja nekomprenebla teruro premegas en brusto. Oni sentas sin eta, mizera, senforta antaŭ tiuj povoj kiuj vin ĉirkaŭas kaj nevole oni atendas ke, el tiuj grizaĵoj, eliros nekonataj diaĵoj.

Atente, zorgante ĉiun paŝon, ni daŭrigis iradon. Estis neeble iri ĝis akvofaleto ĉar nun, vojo en nebulo estus tro danĝera. Ni decidis atingi ian « Mas » t. e. montan dometon kiun mi sciis en proksimaĵo.

Baldaŭ ĝi ekaperis en nebulaĵo. Tie estis tri homoj, viro kaj du junulinoj, el tiu pirenea raso en kia, dekkvinjara knabino estas ofte plenkreska kaj matura virino. Ni diris nian staton. Neeble reiri per vojetoj de veniro pro nebulo. Ni dezirus atingi militan vojon kiu nin irigos malrapide sed sendanĝere ĝis urbo. Estis konsilado. Fine la viro ekdiris: — ĉiu flanke estas malbone por ili! — Kaj klarigis al ni ke tio estis neeble ankaŭ, ĉar riverfalo furioziĝis kaj fariĝis ne trairebla. Aŭdu.... Efektive en fundaĵo muĝis potenca, teruriga voĉo kiel bojado de milionoj da hundoj. Tamen li proponis al ni nin konduki per aparta vojeto. Ni akceptis kaj lin sekvis. Li iradis antaŭ ni tra ŝtonaro plena je montaj stipoj, blankaj erikoj, odoraj timianoj, stranga dezerto en kiu okuloj vidis nenion similan al ia vojo. Li saltis de ŝtono sur ŝtonon, sekvante fluojn gravuritajn de la pluvo, kaj ni postiris, haltantaj ĉiumomente por rigardi strangegan vidaĵon. Kien ni iris tiel fale? ni ne sciis. En kia faŭko bojanta li nin kondukis, ne komprenis ni, sed ĉiuflanke tra ŝiraĵoj de nebulo aperis blankaĵoj kun formoj nekonataj, ŝtonegoj proksimaj jen videblaj, jen ne.

La bruo de riverfalo fariĝis ĉiam pli fortega, kaj subite ni ĝin vidis. En mallarĝa interspaco de ŝtonegoj ĝi kuris furioze, ŝprucante ĉion per blanka ŝaŭmo. Arboj elŝiritaj kun radikoj baris tie kaj tie vojon de akvaro kiu ŝveliĝis kaj saltigis, super tremanta digaĵo, ondojn bojantajn je sekvo sinpersekutantajn. Ŝtonoj dikaj kaj larĝaj ruliĝis en tiu danco kiel grenŝeloj en ventolilo, kaj kelkajn metrojn poste ĉio, kriadante, plaŭdante, baraktante saltis en ŝaŭma ĥaoso kiu plenigis larĝan poluritan pelvegon de blanka marmoro. Akvaĵoj freneze turnadis kelkan tempon kaj ree saltis plimalproksimen kiel nebulaĵo.

. . . .

La viro, rifuzante dankmonon, diris al ni: Nun, jen estas facila vojo; kaj ni foriris silente.

PAUL BERTHELOT, Ceret, Francujo.

Deziras Korespondadi.

29. S° William Goldmann, rue d'Angleterre, 65, Bruxelles (Belgujo), per ilustritaj poŝtkartoj aŭ leteroj, precipe pri la detenema movado kaj kontraŭ alkoholismo; vegetamanto, I. O. B. T.

30. Sro Léon Carlier, 34, rue Godecharle, Ixelles, (Belgujo), deziras ke Esperantisto *Angla*, traduku por li, la plej ĝuste kiel eble, la 25 unuajn liniojn de tiu ĉi verketo: « To a locomotive in winter » de Walt Whitman (volumo « Leaves of grass », parto titolita: « From noon to starry night »), eldonita de G. P. Putman's sons, en Londono.

(1) En tiu ĉi rakonto, la verkisto ne uzis, intence, la artikolon **la**. La legantoj juĝos pri la neceso de tiu forigo.

Principaux Manuels en langue française.

en vente aux dépôts de la Maison HACHETTE & Cie *et chez* SPINEUX & Cie *à Bruxelles.*

Grammaire et exercices de la langue Internationale Esperanto par L. DE BEAUFRONT. — Prix 1.50 frc (port en plus.)
L'Esperanto en 10 leçons par TH. CART et M. PAGNIER. — Prix 0.75 (port en plus.)
Dictionnaire Esperanto-Français par L. DE BEAUFRONT. — Prix 1,50 (port en plus)
Vocabulaire Français-Esperanto par TH. CART, M. MERCKENS et P. BERTHELOT. Prix 2.50 (port en plus.)
Thèmes d'application par L. DE BEAUFRONT. — Prix 2.00 (port en plus),

Nederlandsche Handboeken.

Bij den schrijver te Hilversum (Holland) — **Volledig Leerboek der opkomende wereldtaal Esperanto**, door DREVES UITTERDIJCK, Trompschool, Hilversum. — Prijs : fl : 1.50 (3.75 fr.) verzendingskosten daarboven.
Bij den drukker van *La Belga Sonorilo*, Nieuwe Wandeling, 4, Brugge : **Het Esperanto in tien lessen**, aan fr. 0,50.

La « *BELGA SONORILO* » acceptera des annonces qui devront satisfaire aux conditions suivantes :
1° Être rédigées exclusivement en Esperanto ;
2° Emaner de personnes s'engageant à correspondre en Esperanto ,
3° Les annonces doivent être prises pour une année entière.

1/16 de page annuellement fr. 8.00
1/8 » » » » 15.00

De «BELGA SONORILO» *aanveerdt aankondigingen die aan de volgende voorwaarden moeten voldoen :*
1° Opgesteld zijn uitsluitelijk in Esperanto ;
2° Gegeven zijn door personen die zich verplichten in Esperanto te schrijven ;
3° De aankondigingen moeten genomen worden voor een gansch jaar.

1/16 bladz. jaarlijks fr. 8.00
1/8 » » » 15.00

La unua filokarta ĵurnalo publikigita en Francujo

La Carte Postale Illustrée

LA ILUSTRITA POŜTA KARTO.

GRANDA ORA MEDALO DE LA UNIVERSA EKSPOZICIO DE POŜTAJ KARTOJ, PARIZO 1900

UNU NUMERO : 30 CENTIMOJ.

Kosta de la abono : FRANCUJO : *3.00 fr. jare.*
ALILANDO : *4.00 fr. jare.*

Senpagan pruvan numeron oni sendas post peto per ilustrita poŝta karto.
La abonantoj havas la rajton postuli tri liniojn enpresitajn en ĉia numero.

7, rue Pierre-le-Grand, PARIS (VIIIième)

LE PHILOCARTISTE

LA FILOKARTISTO

OFICIALA ORGANO DE LA « CARTOPHILE-CLUB »

JARA ABONO POR ĈIUJ LANDOJ : 3 FRANKOJ.

La Filokartisto estas organo de la kolektantoj de ilustritaj poŝtaj kartoj.

8, rue de la Pépinière, PARIS (VIIIième)

Le Cartophile Illustré

MONATA BULTENO DE LA ILUSTRITA POŜTKARTO

ABONPAGOJ : Francolando. 3,50 frankoj jare -- Alilandoj. 4.00 frankoj jare.

« **Le Cartophile illustré** » enhavas de 16 ĝis 32 paĝojn ; ĝi estas la plej dokumenta kaj la plej bone informita el la tiaj ĵurnaloj. Oni sendos provan numeron al tiuj legantoj niaj, kiuj petos ĝin rekte al la Administracio.

7, Rue de Lille, PARIS.

LA REVUE POLYGLOTTE

REVUO POLIGLOTA POR LERNO KAJ PROPAGANDO DE LA FREMDAJ LINGVOJ

Eliras en la lingvoj franca, angla kaj germana la 5^an^ kaj la 20^an^ de ĉiu monato. — Kosto : jare 5 frankoj.

Sin turni al la Direktoro S^o^ F. HERMANN
25, rue des Charbonniers, BRUXELLES (Nord).

Federacio de la Belgaj Filatelistoj.

Oni Korespondas Esperante.
Pri sciigoj oni sin turnu al la Esperantista Sekretario, S^ro^ J. Coox, Kontisto, en Duffel (Belglando).
Aldonu poŝtmarkon por la respondo.

S^o^ Pierre Nicot de Villemain

8, Avenue Masséna, NICE.

Deziras korespondadi Esperante pri la insignoj kaj la heraldika arto en ĉiuj landoj.
Interŝanĝas ankaŭ poŝtkartojn ilustritajn sed nur pri la militistaro kaj la milita maristaro de ĉiuj landoj.

The Cosmopolitan Correspondence Club

— INTERNACIA ORGANISMO —

Organo : « THE GLOBE TROTTER ».

Alvokas membrojn el ĉiuj landoj. — Pri pli detalaj informoj sin turni rekte al « *The Secretary of the C. C. C.* » Milwaukee. Wisconsin. U. S. A.



ORGANO

DE LA

helpanta lingvo internacia

ESPERANTO

79, St Christopher str.

Montreal

KANADO.

PETU PRUVAN NUMERON.

JARA ABONO:
frankoj 3.00

SPINEUX & C[IE]

— FREMDA LIBREJO —

FONDITA EN 1833

62, Montagne de la Cour

BRUSELO.

Telefono 3688 Telefono 3688

Libroj eldonitaj de HACHETTE & C[IE]

Vendas ĉiujn esperantistajn librojn kaj, ĝenerale, ĉiujn librojn verkitajn en ia lingvo.

KORESPONDANTOJ EN ĈIUJ ALIAJ LANDOJ.

ONI KORESPONDAS ESPERANTE.

LA PERILO DE LA GAZETISTARO.

(L'INTERMÉDIAIRE DE LA PRESSE).

15, rue Ste Gudule, BRUXELLES.

Legas, tradukas, detranĉas ĉiujn ĵurnalojn gazetojn kaj revuojn de la tuta mondo kaj sendas, el ili, ekstraktojn pri ĉiuj objektoj.

Ĉiu kiu deziras interesadiĝi je ia demando, abonas « l'Intermédiaire de la Presse. »

Prezarojn pri abonoj oni sendas laŭ demando.


Oni korespondas en Esperanto.

✻ KOMERCEJO ✻

JULES BONTE

RUE DES BOUCHERS, 55

BRUGES.



Tuta aranĝigo de presejoj. — Fabrikado de maŝinoj por presi. — Ĉiuj iaj specoj da literoj kaj duailoj. — Broĉiloj per nikelfadeno, altranĉiloj, premiloj por atlasigi, numerigiloj, inkoj, kliŝaĵoj, k. t. p.

Post peto, oni sendas, senpage, modelojn kaj prezarojn.

KELKAJ FLOROJ ESPERANTAJ.

Ilustrita Legolibro

DE A.-J. WITTERYCK.

Prezoj por unu numero	En Belgujo : franko : 0,20 En eksterbelgaj landoj : fr. 0,25
Prezoj por kvin numeroj	En Belgujo : franko : 0,75 En eksterbelgaj landoj : fr. 1,00.

Sin turni al A.-J. WITTERYCK, BRUĜO.

« La Belga Sonorilo »

UNUA JARKOLEKTO.

PREZO : Belgujo : 2,50 frankoj.
Alilandoj : 3,00 frankoj.

Sin turni al Sro M. SEYNAEVE, 3, rue de l'Avenir, COURTRAI.

ESPERANTA KOLEKTO DE L. I.

Verkoj zorge elektitaj kaj en plej regula Esperanta stilo.

N-ro 1. **Kurioza Sunhorloĝo,** de S. Poljanskij, kun 4 figuroj kaj 2 kalkul-tabeloj . . . . **0f 50** centim.

N-ro 2. **Esperanta Frazlibro de l' Turisto,** 400 utilaj frazoj en Esperanto kun tradukoj angla, franca, germana, hispana, itala; adresaro de la diverslandaj grupoj kaj societoj Esperantistaj prezaro de lernolibroj, propagandiloj, k. t. p. . **0f 50** centim.
Por membroj de S. I. R. . . . . **0f 35** centim.

N-ro 3. **Esperanta Sintakso** laŭ verkoj de S-ro Doktoro ZAMENHOF kaj aliaj, en Esperanto, de P. Fruictier, ĉefredaktoro de « Lingvo Internacia » . . . . **1,50** fr.

Poŝtmarkoj estas akceptataj nur por 3/4 de ilia valoro.

PARIS, 27, *Boulevard Arago.*